# Je Kristnasko

N° 150, decembro 2021
Teksto kaj muziko de Andrea Vaccari

RE$^4$ LA$^4$ RE$^4$ LA$^4$

Vivu, baldaŭ estas Kristnasko! RE$^4$ LA$^4$
Mi ekde Pasko ĝin atendas LA$^4$
kaj freneze senpaciencas, LA$^4$
ĉiam somere daŭre plendas, LA$^4$
dum tutjar' al neni' alia mi pensas. LA$^4$ RE$^4$

En la urbo, kun fervoro, RE$^4$ LA$^4$
antaŭĝujas mi prirabi LA$^4$
la plej grandajn magazenojn. LA$^4$
Ĉion en la mondo kio aĉeteblas LA$^4$
mi aĉetegi nepras. LA$^2$ RE$^4$

Kaj la vivo belas, se SI-$^4$ RE$^4$
ni Kristnaske estas kune, LA$^4$ RE$^4$
se plenĝoje kantas ni SI-$^4$ RE$^4$
kaj ĝue manĝas kune kun vi. LA$^4$ RE$^2$

RE$^2$ LA$^2$ LA7 LA RE$^2$ X 2

Ek, ni ĉiuj kune manĝu RE$^4$ LA$^4$
ĉiun manĝaĵon kiujn ni povas, LA$^4$
antaŭmanĝon kaj lazanjojn, LA$^4$
torteletojn kaj viandon, LA$^4$
bieron, vinon kaj tortegon. LA$^4$
Tio vere sanigas. LA$^2$ RE$^4$

Ek, ni ĉiuj kune kantu RE$^4$ LA$^4$
de Kristnasko la kanzonojn, LA$^4$
kiuj de pac' estas simboloj, LA$^4$
krome kanti al ni tre plaĉas. LA$^4$
Pri kiu solas ni bedaŭras, LA$^4$
tamen se pri tio vi pensas, LA$^6$
vi ne plu bonfartas. LA$^2$ RE$^4$

Ĉar la vivo belas, se SI-$^4$ RE$^4$
ni Kristnaske estas kune, LA$^4$ RE$^4$
se plenĝoje kantas ni SI-$^4$ RE$^4$
kaj ĝue manĝas kune kun vi. LA$^4$ RE$^2$

RE$^2$ LA$^2$ LA7 LA RE$^2$ X 2

Jes, denove estas Kristnasko! RE$^4$ LA$^4$
Tiom da homoj sur la stratoj, LA$^4$
kiuj alegre estas festantaj LA$^4$
kaj ĉirkaŭvagas kontentaj, LA$^4$
dum la sakojn per donacoj LA$^4$
ili estas plenigantaj. LA$^2$ RE$^4$

Familioj rekuniĝas, RE$^4$ LA$^4$
iuj alvenas el distance, LA$^4$
per aŭ trajn' aŭ aviadilo, LA$^4$
renkontiĝas tre beate. LA$^4$
Tiu kristnaska festa etoso LA$^4$
tiel kortuŝe flagras. LA$^2$ RE$^4$

Mi rigardas ilin festi SOL$^4$
ĉiujn vere tre emocie, SOL$^4$
sed subite, vere strange, RE$^4$
mi ne scias kial mi tion pensas, RE$^4$
ke en la nuna mondo ekzistas LA$^4$
tiom da homoj, mi ja certas, LA$^4$
kiuj, ĉiam solaj, ne bonfartas, LA$^8$
kaj pri Pasko kaj Kristnasko LA$^4$
vere tute fajfas! LA$^2$ RE$^4$

Sed la vivo belas, se SI-$^4$ RE$^4$
ni Kristnaske estas kune, LA$^4$ RE$^4$
se plenĝoje kantas ni SI-$^4$ RE$^4$
kaj ĝue manĝas kune kun vi. LA$^4$ RE$^4$

Kaj Kristnasko belas, se SI-$^4$ RE$^4$
ni tiutage estas kune, LA$^4$ RE$^4$
se plenĝoje kantas ni SI-$^4$ RE$^4$
kaj ĝue manĝas kune kun vi. LA$^4$ RE$^2$

RE$^2$ LA$^2$ LA7 LA RE$^2$ X 4